

Ernst Meurin,
La Ojlda vento

tradukita de Manfredo Ratislavo

En Ojldo iam ferforĝist'
Furzegis, kiam policist'
Arestis tiun kun mieno
indigna, pro trankviloĝeno.

Protestis tiu viro ĉi:
Ne povas esti krimo ĝi,
Li ĝenis ja nur la silenton
lasante elen „Ojldan venton“.

La „Sonoril“ konigis tuj
Eventon ĉi al Germanuj'.
Kaj ĉie sonis la kanteto
de l' „ellasema“ forĝisteto.

*Traduko de la Germana poemo “Der Oelder Wind” de ERNST MEURIN (*1885-12-10) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1996-09-21.*

MR-286-6a / Arg-256-519 (2004-07-03 22:30:01)